

Pola Esperanto-Asocio
filio Gliwice

Kroniko



Jaro 2009

Jubilea jaro

Cent jaroj de Esperanto en Gliwice ! (1909 – 2009)

Oblata renkontiĝo




La 31-an de januaro 2009 en nia klubejo okazis tradicia novjara esperantista renkontiĝo. Partoprenis en ĝi 36 esperantistoj el Gliwice kaj el najbaraj urboj. Estis ankaŭ eksterlandanoj: kelkaj ĉeĥoj el Ostrawa kaj unu germano. Renkontiĝon komencis la prezidanto de nia filio Stanisław Mandrak. Li salutis partoprenantojn kaj diris novjarajn bondezirojn. Poste ĉiuj trinkis kafon aŭ teon, manĝis kukojn, multe babilis kaj kantis esperantajn kristnaskajn kantojn.

Renkontiĝo daŭris 4 horojn kaj estis tre agrabla.



Provokado



La 6-an de marto 2009 en gliwice'a muzeo okazis prezentado de nova libro de s-ro Andrzej Jarczewski titolita **"Provokado - Gliwice 31.08.1939"**.

Aŭtoro, kiu estas ĉefgardisto de radiostacia muzeo, en interesa formo priskribas faktojn kaj la realaĵojn pri hitlera provoko okazinta en Gliwice en la jaro 1939. Li klarigas multe da mitoj, kiuj dum multaj jaroj ekzistis pri tiu historia evento.

Libro estas skribita ĝenerale por juna generacio, kiu scias nenion aŭ malmulte pri tiu historia fakto. Sed ankaŭ aliaj kun intereso tralegos ĝin.

Libro estas skribita en pola lingvo, sed ĝi enhavas malgrandan resumon en kelkaj lingvoj, ankaŭ en **esperanto**.

Aŭtoro klarigas, ke decidis pri esperanta titolo por omaĝi 150-an datrevenon de naskiĝo de Ludoviko Zamenhof kaj 100-an datrevenon de ekfunkciado de esperanta movado en la urbo Gliwice. Ambaŭ datrevenojn oni festos ĝuste en la jaro 2009.

Grupo de **lokaj geesperantistoj** partoprenis en la prezentado de la libro kaj ricevis de aŭtoro aŭtografoj en lia libro.

Jen fotoj el la prezentado





Paskofesto en nia klubejo



La 8-an de aprilo estis nia lasta kunveno antaŭ Pasko. Tiutage ni sidis ĉe tablo ornamita per buketo de printempaj floroj. Sur la tablo estis ovoj, paska babao, leporoj el ĉokolado kaj aliaj dolĉaĵoj. Ni komencis nian kunvenon per bondeziroj kaj divido inter si la pecetojn de boligitaj ovoj. Poste ni manĝis babilante pri paskaj kutimoj en niaj familioj. Estis tre agrable, badaŭrinde pro la proksimiĝanta Paskofesto, multe da anoj ne partoprenis la kunvenon.



La 20-an de majo 2009 en nia klubejo ni interparolis pri organizado de renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj. La renkontiĝo okazos la 21-an de junio sur la pinto Ĉantorio. Ni preparis programon de la kunveno. Antaŭ kelkaj tagoj du glivice'aj esperantistoj estis en Ostravo kaj parolis ankaŭ pri tiu temo kun samideanoj el Ĉeĥio.



Vizito en Ostrava

Meze de majo la urbon Ostrava vizitis delegacio de nia e-grupo. Dum la vizito oni priparolis la aferojn ligitajn kun la Ĉijara, tradicia renkontiĝo sur la monto Ĉantorio.

Gastigantoj montris kelkajn interesajn objektojn de sia urbo. Gastoj povis rigardi la panoramon de la urbo

el vid-turo, kiu troviĝas sur la urbodomo de Ostrava.

Oni menciis ankaŭ pri venontjara kongreso de ĉeĥaj esperantistoj, kiu estas planata aŭtune en Ostrava. Gastoj invitis ostravajn gekolegojn en novembro al Glivice por komune festi 100-jariĝon de loka e-grupo.

La fotoj el Ostrava



La 21-an de junio 2009 sur la pinto Ĉantorio okazos ĉiujara renkontiĝo de ĉaĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj. Ĉantorio invitas ĉiujn esperantistojn. Venu !



La 21-an de junio 2009 okazis ĉiujara renkontiĝo de esperantistoj sur la pinto Ĉantorio. Partoprenis 16 esperantistoj el Ĉeĥio kaj Pollando. Solenajn vortojn flanke de Ĉeĥio diris Ludislav Nemec. Li parolis ankaŭ pri Ostravo kaj venonta ĉeĥa kongreso. De pola flanko diris Aleksander Zdechlik pri UK en Bjalistoko okaze de 150-a datreveno de naskiĝo de Ludoviko Zamenhof kaj pri centjara jubileo de esperanto-movado en Gliwice. Malgraŭ de malbona vetero kaj malgranda kvanto de partoprenantoj la kunveno estis tre agrabla.





Interesa renkonto en Olštino

De 25-a de junio ĝis la 1-a de julio okazis Frusomera Renkonto de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtinon "FREŜO 2009". En ĝi partoprenis 75 esperantistoj el tuta Pollando kaj ankaŭ eksterlandanoj. Kelkaj anoj el glivice'a klubejo estis ankaŭ en Olštino. La programo de la aranĝo estis tre riĉa. Ĉiutage ni vizitis interesojn lokojn en Olštino kaj en ĉirkaŭaĵo. Vespere okazis diversaj distraj programetoj. Ne mankis ankaŭ interesajn prelegojn. Ĉiuj partoprenantoj povis kontroli sian lingvo-konon dum kvizoj preparitaj kaj ĉiutage gvidataj de Marian Zdankowski.

Ni partoprenantoj de FREŜO 2009 el nia klubejo tre dankas al ĉiuj organizantoj de FREŜO pro la interesa aranĝo kaj pro la agrabla etoso kiu regis dum la tuta renkonto!





Universala Kongreso de Esperanto

Multaj esperantistoj el nia glivice'a rondo partoprenis la 94-an Universalan Kongreson de Esperanto en Bjalistoko. Kelkaj eĉ laboris dum Kongreso kiel helpantoj.

Kongreso en Bjalistoko estis tre bone organizita. Programero estis tre riĉa kaj interesa. Ni gratulas al organizantoj! Ni glivice'anoj precipe dankas al bjalistokaj esperantistoj pro laboro, granda dungeco kaj gastameco!





Renkonto en Żywiec

Studentoj el glivice'a politekniko interesiĝas pri Esperanto kaj invitis esperantistojn el nia klubo al Żywiec.

La 24-an de oktobro Aleksander Zdechlik kaj Krystyna Grochocka (anoj de nia klubo) veturis al junulara rifuĝejo en Żywiec, kie okazis renkonto kun studentoj. En la kunveno partoprenis ĉirkaŭ 70 studentoj el Pollando. Estis ankaŭ studentoj el Germanio, Hispanio, Francio kaj Turkio. Aleksander Zdechlik rakontis pri ideo de Esperanto, pri kreinto, pri la lingvo ktp. Studentoj montris grandaninteresiĝon pri la temo kaj faris multe da demandoj. Dum la renkonto regis agrabla etoso. Ni esperas, ke kelkaj partoprenantoj fariĝos esperantistoj, ĉar nia movado bezonas junajn anojn.



Ni memoru pri niaj mortintoj

Sabate la 31-an de oktobro 2009 niaj kolegoj okaze de proksimiĝanta festo je Ĉiuj Sanktuloj (1-a de novembro) vizitis tombejon kie dormas eterne esperantistoj de nia klubo: Eugeniusz Matkowski (esperanta poeto) kaj Tadeusz Faliński (eksa prezidanto de nia klubo). La kolegoj Stanisław Mandrak kaj Aleksander Zdechlik purigis la tombojn kaj ekbruligis sanktajn fajrojn sur la tomboj.





Seminario en Herzberg

Ekde la 8-a ĝis la 18-a de oktobro en Herzberg okazis la unua seminario de programo GRUNDTVIG "Lernado dum la tuta vivo". Aŭtorino de la programo estas prezidantino de PEA **Halina Komar**. La programo daŭros du jarojn kaj preparos instruistojn por laboro kun homoj en "tria aĝo".

En seminario partoprenis 24 esperantistoj el Pollando kaj el Slovakio. El nia klubo estis: Stanisław Mandrak, Gizela Sklorz kaj Krystyna Grochocka.

Programo de la seminario estis tre riĉa. Studhoroj daŭris ekde la 9-a ĝis la 19-a horo (kun tagmanĝopaŭzo). Partoprenantoj faris diversajn gramatikajn ekzercojn por perfektigi la lingvon. Estis multe da lecionoj dediĉitaj al metodiko de instruado. Partoprenantoj ekkonis ankaŭ diversajn lernolibrojn kaj kiel uzi komputilon en lernado kaj instruado de Esperanto. La lecionojn gvidis interalie: Zofia Korody, Katalin Kovats, Stefan MacGill, Peter Zilvar, Peter Balaz.

Partoprenantoj de programo GRUNDTVIG vizitis ankaŭ Esperantan Urbon Herzberg, ĝian kastelon kaj Interkulturan Centron Herzberg (ICH.)





Okaze de 100 jaroj de esperanta movado en Gliwice ni faris novan markon de nia aranĝo.

Aŭtorino de marko estas esperantistino
Ewa Caban



GRUPE 2009 daŭris ekde la 6-a ĝis la 8-a de novembro 2009 jaro. En ĝi partoprenis ĉirkaŭ 50 esperantistoj el tuta Pollando. Estis ankaŭ gastoj el Germanio.

La kunveno komenciĝis vendrede postagmeze per malfermo de ekspozicio okaze de 100 jaroj de esperanta movado en Gliwice. Poste nia gasto el Germanio Gerhard Hirschman prelegis pri nova maniero de kooperado inter Eŭropo kaj Afriko.

Sabate je la 10-a horo okazis solena malfermo de GRUPE-13 dum kiu prezidanto de nia filio Stanisław Mandrak kore salutis ĉiujn partoprenantojn.

Poste prelegis:

Nina Pietuchowska - "Rememoroj pri preparado kaj kongresaj laboroj dum UK-o en Bjalistoko "

Roman Dobrzyński - "Sekretoj de pola himno."

Zofia Śmistek - "IKUE kongreso kaj pola sekcio IKUE"

Dum la aranĝo estis prezentitaj du filmoj de Roman Dobrzyński: "Zakopane 2005 - IJK" kaj "Herzberg 2006". **Vespere** Georgo Handzlik prezentis monodramon "Ludoviko - Lazaro".

Dimanĉe partoprenantoj vizitis gliwice'an radiostacion. Tie ĉefgardisto de radiostacia muzeo Andrzej Jarczewski tre interese rakontis pri historio de Gliwice kaj radiostacio.

Dum la kunveno GRUPE-13 funkcis libroservo kun interesaj eldonaĵoj kaj oni povis gustumi kaj konatiĝi kun abel-produktoj el abelujo de esperantisto el Bielsko - Biala, s-ro Roman Schodnicki.

Organizantoj de GRUPE-13 kore dankas al ĉiuj partoprenantoj pro alveno al la kunveno kaj invitas venontjare.



Festotago en Gliwice
okaze de 150-a datreveno de naskiĝo de Ludoviko Zamenhof



Merkrede la 16-an de decembro ni renkontiĝis solene festante la faman jubileon de naskiĝo de nia majstro. Uzante komputilon Stanisław Mandrak prezentis tre interesajn ĉinajn TTT-paĝoj dediĉitajn al Ludoviko Zamenhof. Ni sidis ĉe ornamita tablo kun kandeloj kaj trinkis ĉampanon por soleni la feston. Ni konstatis, ke verko de nia majstro kunligis nin glivice'ajn esperantistojn. Sen Esperanto ni neniam renkontiĝus kaj kompreneble ne renkontiĝus aliajn esperantistojn. Poste ni rememoris famajn niajn geklubanojn kiuj jam forpasis.

Fine nia koleginino Krystyna Grochocka prezentis siajn multimediajn prezentadojn okaze de Kristnasko, ĉar nia kunveno estis la lasta en la jaro 2009. Ni deziris al ni aparte Gajan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron 2010.

